| | |
|---|---|
| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 28 n-ro 1/2(123/4) 25.04.1977. |

# LA PERIODO DE "STURM UND "DRANG": JOHANN GOTTFRIED HERDER

(OSKAR STOLBERGER, GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO)

Jene mi memoras pri la germana filozofo, verkisto, kritikisto kaj artotradukisto, pri elstara figuro en la kadro de la literaturhistoria periodo "Sturm und Drang" (Sturm und Drang der Geister, t.e. ŝtormo kaj bolado de spiritoj, la literatura periodo inter la 1767. kaj 1787. de junaj literatoroj etburĝaj. Ĝia nomo devenis de la samtitola dramo de F.M. Klinger, 1752.-1831. La ĉefa fonto de "S.u.D." estis la filozofio de *Rousseau:* "Reen al la Naturo", troiga racionalismo, la filozofio kontraŭciviliza. Antaŭuloj: praromantikuloj *Klopstock, Lessing, Hamann.* Reprezentantoj krom *Herder: Lenz, Bürger,* la juna *Goethe, Schiller.* Idealoj: la biblio, Homero, Osiano, la popolkantaro, *Shakespeare.* La movado alfrontis la rigidajn tradiciojn, la aŭtoritaton kaj la absolutisman despotismon.) Do, mi memoras pri la pensulo Herder. Li devenis de etburĝa familio malriĉa. Lia patro estis kontoro. En la jaro 1762. li fariĝis studento ĉe la Universitato Königsberg, kie li studis medicinon, filozofion kaj teologion. Dum la studoj li aŭskultadis prelegojn eĉ de J.G. Hamann. *(Johann Georg Hamann,* 27.8. 1730.-21.6.1788., religia filozofo idealisma, kritikisto kaj verkisto, malamiko de la klerigado. Kritikante Kant-on, li ellaboris

la intuician dialektikon; pri la teorio de la lingvo li polemikadis kun sia disĉiplo Herder.)

Herder ankaŭ aŭskultis - kompreneble - la prelegojn de I. Kant, kiu kiel juna, t.n. antaŭkritika, iĝis verdire lia instruanto. *(I. mmanuel Kant*, 1724.-1804., kiel filozofo havis du evoluŝtupojn: 1. "la antaŭkritika", do ŝtupo antaŭ la apero de verkoj "Kritik" aŭ kosmologia periodo, ĝis proks. 1770.; 2. la postkritika de epistemologio, de racio, post la ellaboro de la kritiko priracia.)

De la jaro 1764. ĝis la 1769. Herder estis dekano en Riga. Liaj predikoj havis grandegan aŭskultantaron, lia parolstilo estis populara. W.v. Humboldt deklaris pri tio jene:

"Neniam homo parolis pli bele ol Herder."

*(Wilhelm von Humboldt*, 22.6.1767.-8.4.1835., germana filologo, filozofo kaj lingvisto, frato de la fama natursciencisto A. Humboldt, amiko de Goethe kaj de Schiller).

+
\+ +

Mi ne emas decidi la akademian disputon, al kia "ismo" precipe apartenis Herder. Li estis unu el la plej multflankaj kaj profundaj pensuloj en la germana kaj tutmonda kulturhistorioj. Li okupiĝis ne nur pri la teologio, sed li celis ankaŭ racionalismon de la popola logiko. (Racionalismo: 1. en filozofio, epistemologia konvinko, ke la logikaj karakterizoj de scio - la ĝeneralo kaj neceso - estas nededukteblaj de la sperto, de la empirio. Tiusence ĝi estas antipodo de la empirismo: Demokrito, Elestoj, Sokrato, Platono, Aristotelo, Descartes, Spinoza, Herder, Leibnitz, Hegel, H. Cohen kaj aliaj; 2. Historie: en la historio de scienca pensado ĝi estis konvinko pri nepraj aŭtoritato kaj ĉiopovo de la homa racio, ekz. dum la klerigado: kontraŭ-skolastikeco. 3. en la teologio: tendenco, "racionala teologio" (Kamaryt). Ĝi estas ekz. skeptiko pri la revelacio ktp. (Vidu: "Über neueste deutsche Literatur. Fragmente. 1766.-68". - "Pri la plej nova germana literaturo. Fragmentoj. 1766.-68." kaj "Kritische Wälder" - "Kritikaj arbaroj", 1769.).)

Do, en la persono de Herder kunfandiĝas ĉiuj anticipaj elementoj al lia speciala historiisma "ŝtormo kaj bolado". Li estas

disĉiplo de Hamann kaj Kant. En Parizo li konatiĝas kun la ideoj de Rousseau. *(Jean-Jacques Rousseau,* 1712.-78., filozofo, sociologo, teoria pedagogo kaj estetikisto; gvidanto de la etburĝa flanko dum la franca klerigado. Lia mondkoncepto: deismo, lia epistemologio: sensualismo; politike li estis kontraŭ-despotismulo.) Herder kompreneble ankaŭ konatiĝis kun la ideoj de Diderot. *(Denis Diderot,* 1713.-84., ideologo de la revolucia franca burĝaro de la 18-a jarcento, filozofo materialisma, verkisto kaj estetikisto, elstara figuro inter la enciklopediistoj.)

Ĉi-tutan praromantikan idealon Herder transdonas en la jaro 1770. al la juna Goethe en Strassburg tra sia persona raviĝo spertita. Laŭ la hungaro Antal Szerb "verdire ĉi tiu transdono estis la plej grava ago de Herder" (Antal Szerb: "A világirodalom története" - "Historio de la mondliteraturo", ĉap. "Sturm und Drang", Budapest, 1973., Magvetö, p.448.) Tio efikis al la juna Goethe per turniĝo, kiu realiĝis en popolecaj poemoj. Tial Goethe rememoris dankeme la renkontiĝojn kun Herder en siaj verkoj, ekz. en "Dichtung und Wahrheit" (pli precize: "Aus meinem Leben, Dichtung und Wahrheit" - "El mia vivo, poezio kaj vero".)

La kulturpesimismo ĉe Herder koncerne la civilizajn jugojn estas eĉ pli forta ol ĉe Rousseau. Herder deklaras la civilizitan homon malpli valora ol primitivulon. Li estas je sama frekvenco al diraĵo de lia majstro Hamann:

"Poezio estas gepatra lingvo de la homa gento."

"Poesie ist die Muttersprache des menschlichen Geschlechts." (Ĝi estas ankaŭ slogano de "Sturm und Drang".)

De la jaro 1771. ĝis la 1776. Herder estis kortega predikanto en Bückeburg. Dum tiu ĉi periodo li inkliniĝis al mistikismo. Goethe sentis ankaŭ la samon (t.e. hilozoisma kategorio pri entelehio - "antikva principo de la naturo", laŭ Kamaryt). La verkoj el ĉi tiu tempo estas jenaj:

"Traktato pri la origino de la lingvo" ("Abhandlung über den Ursprung der Sprache"), 1770.

(Kune kun Goethe) "Pri la germanaj karaktero kaj arto" ("Von deutscher Art und Kunst"), 1773.

En la jaro 1776. Herder fariĝis dekano en Weimar. Tie li retrovis la vojon al la racionalismo. Li kolektadis popolajn kantojn

el la tuta mondo kaj aperigis en "Völkersliedern" 1778.-79., poste 1807. (La eldonon kun titolo "Stimmen der Völker in Liedern" - "Voĉoj de la popoloj en kantoj", redaktis *Johannes von Müller*). Ĉi tio estas lia "eterna bukedo" da popolaj kantoperloj, lia idea heredaĵo, lia mesaĝo al la posteularo, lia pruvo pri la internaciismo.

En la jaro 1781. Herder verkis la premiitan skribaĵon "Pri la efiko de la poeziarto al la nacia moraro en malnovaj kaj novaj tempoj" (Über die Wirkung der Dichtkunst auf die Sitten der Völker in alten und neuen Zeiten").

Li mem pli ŝatis sian skribaĵon "Vom Erkennen und Empfinden der menschlichen Seele" ("Pri inteligenteco kaj senteco de la homa psiko"). Tie ĉi estas trovebla lia teorio pri genio: 1. La popola poezio estas ununure prava; 2. Kio estas genia, tio estas ankaŭ popola; 3. Nur la geniuloj rajtas per sia intuicio disrompi la sufokigan muron de la civilizacio, ks.

\+
\+ +

Ek de la jaro 1784. ĝis la 1791. aperadas lia kvarvoluma ĉefverko filozofia "Ideen zur Philosophie der Geschichte der Menschheit" ("Ideoj al la filozofio de la tuthomara historio"). La idealo de Herder estis la antikva humanismo kun ties germanigo. Li akre atakadis la rigidan, idealisman koncepton de Kant. (Temas pri la idealismo en estetiko. Kant: "Nun sage ich: Das Schöne ist das Symbol des Sittlichguten" - "Nun diras mi: La belo estas la simbolo de morala bono". Kp. "Kritik der Urteilskraft, 2. Absch.: Symbol der Sittlichkeit). György Lukács, hungara estetikisto marksisma, deklaras jene: "Kant estis ekstreme-subjektivisma, ja ultrasubjektivisma idealisto kaj tial lia tro formalisma kaj rigida respondo (al demando pri rilatoj inter Praktika kaj Bela - rimarko de O.S.) elvokis multflankajn protestojn, ekz. ankaŭ Herder tuj ekdisputis kun li post la apero de 'Kritik der Urteilskraft'" (Adalékok az esztétika történetéhez - "Komplementoj al la historio de estetiko", vol. 1, p.221.) Kp. literaturon pri la memcelo de arto, kontraŭ la disprenigo de Belo, Bono kaj Vero. Koncerne la Kant-teorion pri la historio Herder atakis la dualismon kaj agnostikismon, precipe la idealismajn trajtojn. (Laŭ la Filozofia Vortaro de S.

Kamaryt dualismo ĝenerale estas metafizika supozo pri du kvalite diferencaj ekzistaj principoj, du substancoj efektive ekzistantaj, kiuj estas du esencoj de ĉiuj fenomenoj. Historie: Taleso, Sokrato, Anaksagoro, antikva Oriento, Descartes, Kant, anoj de la psikofizika skolo de paralelismo, ktp.)

Agnostikismo de Kant: "Ĉefa karakterizo de la Kantana filozofio - skribas Lenin - estas la interpacigo de la materialismo kun la idealismo, la kompromiso inter ambaŭ tendencoj, unuigo de heterogenaj tendencoj, antipodaj unu al la aliaj. Kiam Kant supozas, ke al oniaj imagoj identas io ekzistanta ekster la homo, iu aĵo "en si" - Ding an sich -, tiam li estas materialisto. Se tiun ĉi "aĵon en si" li deklaras kiel ne ekkonebla, transmonda, tiam li estas idealisto." (Lenin: Materialismo kaj empiriokritikismo, ĉap. IV, 1. Kritiko de Kantismo de maldekstre kaj dekstre.) Do, Herder apartenis - apud Descartes, Spinoza kaj Leibnitz, kc. - al la progresemaj anoj de la racionalismo. Li disvolvis sian specialan historiismon. (Historiismo: unu el la ĝenerala kaj scienca principoj por alproksimiĝi la realecon objektivan, laŭ kiu en la procesoj al scienca observo kaj praktika transformo de la realo ĝi devas esti konsiderata kiel daŭranta kaj evoluanta laŭ la tempo. Pro troa atento pri ŝanĝoj ĝi ne vidas la aferon mem. Kontraŭaj terminoj: realismo, dogmismo, sistemismo. Kp. Kamaryt. Historie: 1. Antaŭmarksisma: Vico, Voltaire, Herder, Rousseau, Diderot, Fichte, Hegel, Saint-Simon, rusaj revoluciul-demokratoj, 2. Marksisma: Marks, Engels, Lenin kaj ceteraj.)

Certe la historiismo de Herder jam estas dialektika kaj baziĝas preskaŭ tute sur materialisma fundo. Pri la antaŭaĵoj de tiu dialektiko oni devas scii, ke la tuta materialisma tendenco de germanaj kleriĝado kaj "S.u.D." origine elkreskis el la panteismo de Spinoza. Goethe kaj precipe nia Herder pluevoluigis ĉi tiun kernon al direkto de la Dialektiko.

Goethe: "Das Gebildete wird immer wieder zum Stoff."

Schiller: "Gutes aus Gutem, das kann jeder Verständige bilden.
Aber der Genius ruft aus Schlechtem hervor.
An Gebildetem nur darfst du, Nachahmer, dich üben.
Selbst Gebildetes ist Stoff nur dem bildenden Geist."

Herder disvolvis la kernon al plua direkto. En la supre menciita verko "Ideen..." li disvolvis sian teorion pri la historia progreso pritraktinte ideojn karakterizantajn diversajn epokojn dum la historio analoge al la evolucio de organika mondo, de naturo kiel ion organike estiĝintan el difinita nacia grundo kaj en specifa interligo kun objektivaj rilatoj naturaj kaj kulturtradicioj. Kp. Feuerbach, Hegel, Engels, Lenin. Vd. N.P.Bannikova: "J. G.Gerder" (-Granda Soveta Enciklopedio, vol. 6, p. 355/1053, Moskvo, 1971., 3a eld.) Pri tio mencias Hegel: "...was wir in der Wissenschaft und spezifisch in der Philosophie sind, haben wir gleichfalls der Tradition zu verdanken, die sich um alles, was vergänglich ist und was daher vergangen ist, wie Herder es genannt hat, als eine heilige Kette schlingt und, was die Vorwelt erbracht hat, uns erhalten und überliefert hat" (... kio ni estas en la scienco kaj specife en la filozofio, tion ni ŝuldas same al la tradicio, kiu volviĝas ĉirkaŭ ĉio, kio pereas, do estas pasinta, laŭ Herder kiel sankta ĉeno, kaj kion la pramondo kreis, konservis kaj tradiciis al ni.") Cito el "Sämtliche Werke, Kritische Ausgabe, Bd. 15a: Vorlesungen über die Geschichte der Philosophie. Einl.: System und Geschichte der Philosophie". Kiel plej gravan principon de la tuthomara progreso, Herder konsideras la evoluon al realiĝo de *humaneco kaj justeco*. Laŭ li - kiel ankaŭ laŭ Schelling kaj Hegel - la subjektivaj celoj de homoj, resp. individuoj, ne koincidas kun ties historiaj rezultoj objektivaj.

+ + +

En la jaro 1793. li verkadis la "Briefe zur Beförderung der Humanität" (Leteroj pri akcelado de humaneco). En ĉi tiuj leteroj Herder pridesegnadis larĝaspektan bildon de la tutmonda historio ek de la antikvaj kulturoj - Ĉinio, Hindio, ktp. - ĝis la 14a jarcento.

Krome inter ceteraj, li traktadis ankaŭ la temon pri milito. Mi citas: "La milito, kiu ne estas necesa por la memdefendo, pli vere ega atako kontraŭ pacema najbara popolo, estas fihoma ekspedicio, pli malica ol ago de la bestoj portante mortigon kaj dezertigon al la nacio, kiun ĝi atakas, sed ankaŭ buĉas la nacion senkulpe militantan. Kia spektaklo estas pli abomena ol du armeoj,

kiuj murdas unu la alian senofendite? Kaj la sekvoj de la milito estas malsanoj, lazaretoj, malsato, pesto, rabado, perfortoj, dezertigo de la landoj, sovaĝaj animoj, detruitaj familioj, korupteco. Tiu opinio estas disvastigenda, la gepatroj devas sugesti la spertojn al la infanoj, por ke la terura vorto de "milito" estu malamata. Ne milito, sed paco estas natura stato de la homaro ne subpremita." (Kp. Herders Werke, vol. 5., p. 176. Erste Gesinnung. Aufbau-Vrl.)

Ek de la jaro 1790. Herder pristudinte de siaj instruintoj la romantikismon ekkomencis kontraŭstari, disputi kun ĉi tiu "mezepoka", rigida romantiko, por starigi la germanan klasikismon anstataŭ la Rom-antikva. Dum liaj lastaj vivojaroj el la starpunkto de la empiriismo li akre polemikadas kun la epistemologio kaj estetiko de la maljuna "postkritika" Kant, ekz. en "Metakritik zur Kritik der reinen Vernunft" kaj en "Kalligone" (Metakritiko al la kritiko de pura racio - aludo pri verko de Kant.)

Laŭ György Lukács "Herder en sia verko "Kaligone", eĉ se kelkloke per malveraj argumentoj, akre primokas la kontraŭdirojn de la Kanta argumentado". (Vd. en "Komplementoj al la historio de estetiko", vol. 1, p. 141.)

La Herdera vivoverko estas profunde kaj organike kunligita kun la slavaj kulturoj. Eble pro tio efikis ĝi al tiel multaj slavaj literaturoj kaj filozofioj, ekz. al Ruslando peris "herderismon" N.M.Karamzin. (Nikolaj Mihailoviĉ Karamzin, 1.12.1766. - 22. 5.1826., rusa verkisto, publikisto kaj historiisto.)

La politika starpunkto de Herder estas respegulaĵo de liaj racionalisma kaj prihistoria dialektiko "organika". Li kontraŭis la koloniajn militojn. Ekz. li aprobis, ke la usonaj kolonioj sukcesis pri sendependeco batalantaj kontraŭ Anglio, sed li plendis, ke dum tiu milito la indiĝenaj indianoj, kiuj estis originaj potenculoj, estis ekstermitaj poparte. Li karakterizis komercon pri nigruloj sklavaj kiel honton de la civilizo. Li pruvis per rezultoj de siaj esploradoj, ke neniu popolo estas rajtigita subjugi alian starantan sur malsupra vivnivelo.

\+

\+ +

La filozofo Herder eble ne estis geniulo, tamen liaj ideoj vivis plue. Oni povas konstati, ke Herder - apud Kant, Fichte, Schelling, Schiller, Goethe, A.Smith, D.Ricardo, kc. - estas antaŭulo de Hegel. *(Johann Gottlieb Fichte*, 1762.-1814., germana filozofo, reprezentanto de la germana idealismo klasika. *Friedrich Joseph Schelling*, 1775.-1854., germana filozofo, universitata profesoro, ano de la germana idealismo klasika. *Johann Christoph Friedrich Schiller*, 1759.-1805., germana poeto, plejsignifa - apud Goethe - figuro de la germana klasikismo; amiko de Goethe, 1749.-1832., malamiko de Herder. *Adam Smith*, 1723.-1790., angla ekonomo, burĝa ekonomiko klasika, kio estis unu el la fontoj de la marksismo; li konceptis ekonomian vivon laŭ procesoj natursciencaj - "natura ordo". *David Ricardo*, 1772.-1823., sama komento.)

Do, Herder transprenis, pluevoluigis kaj sistemigis la antaŭajn dialektikojn, inspiris ilin al la Hegela objektiva kaj absoluta idealismo.

La historiismaj principoj de Herder efikis diversmaniere ankaŭ al germanaj romantikistoj. Lia sensualisme-empiriisma karaktero en la antropologio evoluis plu ĉe *Ludwig Feuerbach* (1804.-1872., germana filozofo metafizike-materialisma, sensualisma; koncerne historion kaj religion li estas - kontraŭe al Herder - idealisto, sed metafizike kontraŭa al Hegel. Plej gravaj estas liaj antropologiismo, kontraŭ-agnostikeco, teorio de la "senkonscia konscio").

Krom la filozofia kaj estetika, estas elmontreblaj ankaŭ mondliteraturaj efikoj de la Herdera idearo, ekz. ĉe J.P.F. Richter, A. von Arnim, C. Brentano, J.F. von Eichendorff, E.T.A. Hoffmann kaj ceteraj germanoj, krome ĉe Karamzin, A.S. Puŝkin, Dostojevskij kaj ceteraj el la slava Kulturregno. *(Johann Paul Friedrich Richter*, pseŭdonomo Jean Paul, 21.3.1763.-14.11.1825., germana verkisto sentimentalisma, li apartenis al la amikaro de Herder. *Achim von Arnim*, 1781.-1831., eldonis kun Brentano la popolkantaron "Das Knaben Wunderhorn", kiu enhavis nur germanajn kantojn, eĉ laŭ regionoj, do folklorajn specialaĵojn, do ne laŭ la internaciema prin-

ciparo de Herder. *Clemens Brentano*, 1778.-1842., kiel fenomeno literatura li estis duone latina, duone germana kun tendencoj romantikaj, sorbitaj francajn impresionismon kaj dekadencon. *Joseph Freiherr von Eichendorff*, 1788.-1857., poeto, bienposedulo, partopreninto de la liberigaj bataloj; post Hölderlin li estas la plej elstara lirikisto de la germana romantiko. *Ernst Theodor Amadeus Wilhelm Hoffmann*, 1776.-1822., germana muzikdirektoro, pentristo kaj verkisto, la plej populara germana romantikulo kaj fabelisto - "Fabeloj de Hoffmann". *Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin*, 1799.-1837., transprenis la komune-eŭropan romantikon kaj trovis specialan romantikismon rusan - "J.Anegin". *Fjodor Miĥajloviĉ Dostojevskij*, 30.10. 1821.-28.1.1881., kun L.N. Tolstoj estis la rusa "stelparo" - kiel ĉe la germanoj Goethe kaj Schiller. Gravas lia psikologio pri amo, malamo, instinktoj kaj aliaj etikaj problemoj).

\+ + +

Fama hungara literatur-historiisto Antal Szerb deklaris pri Herder: "Lia vivo estis ja tre kompatinda: li devis konscii, ke la gloro de lia disĉiplo Goethe nebuligas, dronigas lian eĉ etan gloron. Li pro tio suferadis dum sia tuta vivo" (Antal Szerb: "A világirodalom története" - "Historio de la mondliteraturo", Budapest, 1973., p. 450.)

Sed malgraŭ la spirita suferado kaj la rezisto de la ŝtato absolutisma kaj de la feŭda socia reĝimo li fariĝis spirita mentoro, kompaso de la nacio.